



MONATA BULTENO de la Esperanta Societo "FRATECO"

INICIATINIO: S-RO IZIDORO FLORÍA - DIREKTORO: RAMÓN DE SALAS

Administracio kaj Redakelo: Str. RODA, n.º 14-16

MALNOVAJ PAĜOJ

AMA SENTO

(RUSA KANTETO)

La sorto nin eble disigos,
Se estas la volo de Di';
Vin eble ĉi tio ridigos,
Ke kara mi estis al vi;
(Sed eĉ kiam ami vi ĉesos,
Alia fortiros vin sent',
Neniam mi vin ekforĝesos
Por unu feliĉa moment'.

Foriĝos de mi mia forto
Kaj igos enuo je vi
Suferi la batojn de l'sorto
Estingos spiriton en mi.

Sed eĉ kiam vivi mi ĉesos,
Ĉirkaŭos min tomba silent',
Neniam mi vin ekforĝesos
Por unu feliĉa moment'.

Kaj tiam vi min rememoros,
Vizitos la tombon de mi,
Kaj jam tro malfrue vi ploros
Kaj velkos, kaj iros post mi.

Sed se Di' ĉielon permesos
Aŭ punos infera turment',
Neniam mi vin ekforĝesos,
Por unu feliĉa moment'.

Trad. A. GRABOWSKI.

EL M. LERMONTOV

Veleta blankas en etera
Vasteco de la blua mar'.
Pro kio kuras ĝi de l'tero
Kaj kion serĉas sur l'ondar'?
La vento fajfas sur la vojo
La masto krakas kun stertor'
Ho ve! ĝi kuras ne al ĝojo.
Kaj ne de ĝojo kuras for.

Sub ĝi kaj supre-luma brilo,
Sed ĝi celadas nur al vent'
Kiele se en maltrankvilo
Troviĝus paco kaj kontent'.

A. KOFMAN.

Doloriga dato: 18-an-9-1934

Al la memoro de nia urba, eminenta
poeto Sro. Fernando Soteras «Mefisto»
mi dediĉas ĝin.

Insista, sed dubebla sciigo.

Ĉu jes...? Ĉu ne...?

Sur ĉiuj vizaĝoj estas videbla granda pesimismo;
pesimismo akompanata de iom da espero.
Sed...

Ĉu jes...? Ĉu ne...?

Abomena, malĝojiga, tragedia realo. Kio okazis?

La Morto senĉese funkcia kontraŭ la vivuloj
fornabis la vivon el la koro de «Mefisto», la
mirinda, elegante hironia, akra, sed bonintenca
poeto.

[Morto terura! Kial vi prezentigis tiel malĝentile
kaj abrupte al la bona, lojala, bonkora poeto?

Post la kurado de la jaroj, kiam la vivo ekfariĝas
peza, la homoj konsideras vin necesa, eĉ dezirinda,
ĉar ili scias, ke vi fine havigos al ili la sopiratan,
eternan ripozon. Sed vi estas ege mal-simpatia ege
abomeninda, kiam perforte kaj vestita kiel vagonaro
falĉas la vivon de juna korpo.

«Mefisto», eminenta poeto, bona koro: Vi liveris
gajecon al la malgajaj koroj; vi aperigis kontentajn
ridetojn ĉe multaj buŝoj dolore fermitaj; viaj
versaĵoj disemis optimismon kaj bonhumoron ĉien,
kie ili estis legataj.

Kaj nun, kiam vi jam troviĝas ĉe alia mondo
certe pli bela kaj agrabla, ol tiu de la vivuloj,
dediĉas al vi ĉi tiujn liniojn, kiu ĉiam admiris vian
literaturan talenton kaj legis fervore viajn strofojn.

Iru ĉi tiuj vortoj al vi, kiel esprimo de sincera
kondolenco, kiel varmaj larmoj ŝprucintaj de mia
koro. Ricevu ilin, mi deziras. Ili ja havas nediskuteblan
valoron: ili estas skribitaj pli multe, ol per mano,
per koro.

JOSE GASCON.

EL FREMDULA LETERO

Kara samideano:

Via tre ĝojiga letero atingis min en Schuls-Tarasasp, kie mi dum pli, ol tri semajnoj, estis por resanigi mian malfortan hepaton. Schuls-Tarasasp estas mondkonata banloko en belega pejzaĝo meze de la svisaj Alpoj, 1250 metrojn alte.

Oni parolas tie ladine. Ĝi estas malvastparolata lingvo nur uzata de 45000 personoj en Svislando kaj de kelkaj miloj en Aŭstrujo. Krome en Svislando tri milionoj da personoj havas, kiel gepatran lingvon, la germanan (postulo de la alemana gento), 800000, la francan (postulo de la burgundoj) kaj ĉirkaŭ 200000, la italan (langobarda postulo). Tiuj ĉi tri lingvoj estas tute samrajtigataj. Ĉiuj federaciaj leĝoj k. t. p. estas redaktitaj trilingve. La ladina lingvo pro teknikaj kaŭzoj ne havas la samajn rajtojn, sed oni subvencias ĝin, kiel la aliajn, kaj en la ladinaj regionoj oni instruas en la lernejoj ladine, kiel germane en la germanaj, france en la francaj kaj itale en la italaj. Itale oni parolas en la suda parto de Svisujo, france en la okcidenta parto, ladine en la sudorienta parto kaj en la restantaj partoj, germane.

Same, kiel la lingvoj, ankaŭ la diversaj religioj kaj rasoj estas samrajtigataj. Du kaj duono milionoj da enloĝantoj estas reformacianoj (Calvinanoj aŭ Zwinglianoj) kaj unu kaj duono milionoj katolikoj. Por ke neniu religia konflikto ekestu la publikaj lernejoj ne povas esti regataj de pastroj aŭ aliaj ekleziuloj. En multaj vilaĝoj eĉ okazas, ke la reformacianoj kaj la katolikoj alterne uzas la saman preĝejon. Izraelidoj ĉe ni loĝas nur ĉirkaŭ 25000, do por la svisa popolo ne ekzistas judo-problemo, kiel en nia norda najbarlando, Germanujo. Memkompreneble ankaŭ en Svislando estas kontraŭsemituloj, sed nek tro radikalaj nek multnombraj.

... ..

 Plej korajn salutojn via sincera

KURT WALTOLIIV.

MALZORGO KAJ AMO

Ĉio estis kulpo de la piloto. Li unue lasis, ke ŝnurega ekstremaĵo pendis pendole de la ŝippostaĵo, kaj la helico, kvankam tute ne kutimis tian laboron, daŭrigis sian turniĝadon ĝis, kiam nur malmulta ŝnurlongo restis nevolvite. Tiam ĝi haltis, kaj la funkcibaro nur estis trovata post, kiam la ŝipestro diris al la maŝinisto ĉiujn akraĵojn, kiujn li, la piloto, tri ŝipanoj kaj unu ŝipknabo elpensis por li.

La ŝipestro estis la interpretisto per la ordontubo, kiu liveris la nuran rimedon por komunikigi inter la direktilo kaj la maŝinejo, kaj la indignanta maŝinisto oficis, kiel ricevanta viktimo.

La Juvelo pasis ĝuste tiam preter Limehouse kaj evidente ĝi estis devigota resti tie. La ŝipestro ĝin direktis al la riverbordo kaj ligis ĝin al granda kaj malnova, dumasta velŝipo, kiu ripozis laŭlonge de kajo.

Li povis tiam iom atenti la realan ĝenkaŭzinton, kaj la malfeliĉa piloto, kiu estis el ĉiuj la plej sprita elpensinto je akraĵoj, suferis la efikon de la proverbo; malbenoj al aliaj turniĝos kontraŭ

vi. En ĉi tiu okazo ili eĉ venis akompanataj de pluaj.

“Mi iros teren”, diris la ŝipestro fine. “Ni ne ekveturos ĝis la proksima akvoaltiĝo. Kiam la akvo estos plej malalta, malsupreniru kaj fortranĉu la ŝnuron. Tute nova ŝnurego! Mi hontas je vi, Harry.

“Mi pro tio ne miras”, diris la vengema maŝinisto.

“Kion vi volas diri per tio?”, demandis kolere la piloto.

“Ni tute ne bezonas vian malbonhumoron”, interdiris severe la ŝipestro. “Nek malĝentilajn vortojn. La ŝipanoj povas iri teren kaj ankaŭ la maŝinisto, sed li devas zorgi la vaporstreĉon. Estu pretaj por ekveturo ĉirkaŭ la kvina. Vi gardos la ŝipon”.

Li rigardis de la ŝippostaĵo alifoje, skuis malgaje sian kapon, kaj post vizito al sia kajuto transgimpis la velŝipan randon kaj iris teren. La ŝipanoj post rigardo al la helico kaj skuo je sia kapo surbordiĝis ankaŭ, kaj la knabo rigardinte la helicon pretiĝis kapskui, sed kaptis pilotrigardon al li kaj ne kompletigis la ceremonion, ĉar subita ekpenso komprenigis lin, ke tio eble estos malsaniga.

Kiam sin trovis sola la piloto, kiu estis sentema persono, post kapsaluto al ŝipestro Jantell de velŝipo Aquila, kiu jam estis aŭdinta pri la katastrofo kaj pretiĝis esti simpatie sciigema, bruligis sian pipon kaj ekfumis malbonhumore.

Poste levinte sian kapon li vidis, ke la maljunulo estis malaperinta kaj junulino katune vestita kaj portanta pajlan ĉapelon sidis sur junka seĝo atente legante. Ŝi estis tiel bela, ke la piloto tuj forgesis sian priokupon, kaj post zorga aranĝo je sia ĉapo li ekpromenis kvazaŭ hazarde laŭlonge de la ferdeko.

(Maleflice la junulino ŝajnis ne rimarki lian ĉeeston kaj absorbe legadis rigardante de tempo al tempo kaj fajfante per siaj ravoplenaj lipoj merlon, kiu en junka kaĝo pendis de la ĉefmasto.

“Ĝi estas bela birdo”, diris la piloto sin apoginte kontraŭ la ŝiprandon kaj direktante admiran rigardon al ĝi.

“Jes”, diris la junulino levante paron da malhele bluaj okuloj al tiuj kuraĝaj kaj kastankoloraj de la piloto kaj ampleksante lin tute per unu rigardo.

“Ĉu ĝi kantas?” demandis la piloto ŝajnigante grandan intereson.

“Ĝi faras tion foje, kiam ni estas solaj”, estis la respondo.

“Mi supozis, ke la maraero difektis eble ĝian gorgon”, diris la piloto ruĝiĝinte. “Ĉu vi ofte venas en la London’an riveron, fraŭlino? Mi ne memoras esti vidinta antaŭe vian ŝipon.

“Ne ofte”, diris la junulino.

“Vi havas belan velŝipon”, diris la piloto rigardante ĝin, kiel kompetentulo. “Mi ja preferas velŝipon anstataŭ vaporŝipo”.

“Mi tion supozis”, diris la junulino.

“Kial?” demandis ameme la piloto, kiun plaĉis tiu ĉi interesmonro.

“Ĉar ĝi ne kunportas helicon”, diris trankvile la junulino, kaj stariĝinte malaperis malsupren laŭsante la piloton malgaje mireganta.

Li ekkonsciis melankolie post, kiam sin trovis sola, pri tio, ke la plej granda amo de lia vivado

ĵus komenciĝis kaj probable estis finiĝonta post malmultaj horoj. La maŝinisto venis sursipen por zorgi la fajron kaj, ĉar la vaporsipo estis jam sur la rivera, funda ŝlimo, li, kiu estis nature bona, helpis la piloton liberigi la helicon antaŭ, kiam reiris teren. Tiam Harris restis sola pluan fojon rigardante malgaje la dezertan ferdekon de Aquila.

Estis jam la dua posttagmeze antaŭ, kiam aperis tie iu vivmontro krom la merlo. Tiam la junulino revenis sur la ferdekon akompanate de fortika, mezaĝa virino tiel afabla laŭŝajne, ke la piloto tuj komencis:

“Bela vetero”, li diris gaje, dum proksimiĝis antaŭ ilin.

“Tre agrabla”, respondis la patrino sidiĝante sur seĝon kaj lasante malsupren sian laborujon preta babili. “Mi esperas, ke la vento daŭros; ni bezonas ekveturi morgaŭ ĉe la proksima akvoaltigo. Vi forveturos ĉi tiun posttagmezon, mi supozas”.

“Ĉirkaŭ la kvina”, diris la piloto.

“Min plaĉus provi vaporsipon por varii”, diris la patrino, kaj ekparolis torente pri velŝipoj ĝenerale kaj pri tiu sia speciale.

“Tie loĝas ni, kvin personoj enkalkulinte mian edzon kaj du ŝipknabojn”, ŝi diris montrante la kajuton per sia dikfingro; “kompreneble la aero tie fariĝas sufiĉe sufokiga”.

La piloto sopiris. Li pensis, ke okaze estas pli malbonaj aferoj, ol sufokigaj kajutoj.

Kaj Nancy estas tre malkontenta”, diris la patrino rigardante sian filinon, kiu legadis kviete apud ŝi. “Sin plaĉas nek ŝipoj nek maristoj. Ŝia kapo malbonfartas pro tiuj dekcentimaj romanoj, kiujn ŝi legadas.

“Okupiĝu pri via propra kapo”, diris Nancy elegante ne levinte sian rigardon.

“La junulinoj en tiuj romanoj ne respondas tiel al siaj patrinoj”, diris la pli maljuna severe.

“Ili havas patrinojn el alia speco”, diris Nancy sen ekscito turnante la paĝon. “Mi tute malamas ŝipaĉetojn kaj maristojn gudre odorantajn. Mi ankoraŭ ne vidis mariston, kiu plaĉis min”.

La pilota mieno malgajiĝis. “Ja nur estas maristoj ĉie”, li respondis malfiere.

“Estas nenio efika por diri al ŝi”, aldonis la patrino kun stulta, rezignacia rigardo”, ni nur povas lasi, ke ŝi pensu, kiel ŝi volas; kvankam vi parolu al ŝi dudek kvar sinsekvajn horojn tio neniel efikus”.

“Min plaĉus provi”, diris la piloto rekuraĝiĝinte.

“Ĉu vin?” diris la junulino levinte unufoje sian kapon kaj rekte rigardante lin vizaĝen. “Kia senhonto!”

“Eble vi vidis malmultajn ŝipojn”, diris la impresiĝena piloto manĝegante per siaj okuloj sian vizaĝon. “Ĉu vi volas veni tien ĉi por vidi nian kajuton?”

“Ne, dankon!” diris rapide la junulino. Poste ŝi ridetante malicete daŭrigis: “Kvankam mi supozas, ke mia patrino volos; ŝin plaĉas flari ĉe la aferojn de la ceteruloj”.

(Daŭrigota).

LA XII.^a JARA TENDARO EN ĈEĤOSLOVAKUJO

La agrablaj tagoj de la XII^a S. E. L.—tendaro ĉe Banská Bystrica sur Kordiky, en belega Slovakujo, pasis. Kun bedaŭro ĉiuj sin adiaŭis kaj iris por daŭrigi sian mision en la vivo, ĉiu al sia hejmo. Ili bone fartis, ili frate vivis, ili multe parolis pri siaj celoj kaj idealoj, sed malmulte ripozadis, ĉar volas ĉiam laŭ eble plej multe “vivi”, t. e. senĉese labori, oferi, klopodadi por bono de l'homaro.

La tendaro estis interesege spektaklo. La nova skolta generacio preparas novan homaron. De ĝi oni povas plej multe esperi en estonteco. Junaj, freŝaj fortoj, kuraĝaj knaboj kaj knabinoj iras ĝoje renkonte al la malfermiĝanta vivo. Ni, esperantistaj geskoltoj, volas plenumi nian devon skoltan kaj kune ankaŭ eĉ esperantistan. La ideoj de esperantismo kaj skoltismo estas tiel proksimaj, tiel rilatiĝas, ke, kunigitaj tutcerte promesas, eĉ garantias bonan homaraman estontecon. Certe ĉi-tio nin ĉiujn ĝojigas. Nia ĉiama klopodado devas trapenetri ĉies korojn. Neniu malagrablaĵo, neniu komenca malsukceso devas nin timigi. Ni estas anoj de skoltismo, t. e. homoj de kuraĝo, laboro, amo kaj senfina oferado.

[Tiel, kiel ni estis kapablaj venki la naturon, loĝi dum kruda vetero sub libera ĉielo, preĝi, labori, vojaĝi, gardi dum ventoj, pluvegoj kaj fulmtondraroj inter rokoj kaj arbaroj, tiel ni persistos eĉ dum krudeco de l'vivo, dum vortondraroj kaj malamikeco de materiala anaro de l'homaro.

* * *

XII.^a Internacia tendaro de Skolta Esperantista Ligo sur Kordiky, apud Banská Bystrica en Slovakujo (Ĉeĥoslovakujo), daŭris de 16^a ĝis 31^a de julio 1934.

Ĉeestis ĝin 85 skoltoj el 9 diversaj landoj. Apudan ekzerctendareton de SKS-Zvolen ĉeestis 22 skoltoj. Knabinan tendaron ĉe Tajov partoprenis 35 skoltinoj. Entute en kadro de XII.^a SEL-tendaro tendaris 142 geskoltoj.

La regiono estas belega, vere unika por skoltoj. Montara malvarmeto iam estis eĉ iomete malagrabla, sed ĉiuj frue alkiutiĝis. La vivo en la tendaroj estis tre gaja. Eĉ suno ne ŝparis sian varmegon brunigante la tendaranojn ĝis negrosimilo.

La 16-an de julio kunvenadis la partoprenantoj. La sekvantan tagon oni malfermis la tendaron. Esperantaj kantoj disradis tra la valo kaj plenigadis ĝin perdiĝante en la vasteco de la regiono. La oftaj salutoj dum alproksimiĝo de ĉiu gasto, al ĉiu anoncadis, ke tie, en moderna “vilaĝeto”, loĝas kaj vivas gaja, esperantista junularo. La diversnaciaj flagoj montris internaciecon de la tendaro.

Posttagmeze estis oficiala malfermo de la tendaro. Ĉeestis diversaj aŭtoritatuloj. Frato S. E. Mann el Anglujo, ĉefkomandanto kaj anstataŭanto de SEL-estraro, malfermis. Paroladojn faris Paŭlo Balkanyi el Hungarujo, kaj A. M. Macek, SKS-estro kaj komandanto de la tendaro.

Vespere estis internacia tendarfajro, kiun ekbruligis la naciaj reprezentantoj el eksterlando.

Sekvis ripoztagoj, ekskursoj al ĉirkaŭaĵo kaj dimanĉe, la 22-an de julio, belega, interesa “etno-

grafia tago" apud la tendaro. Jam matene venadis la gastoj el ĉirkaŭaj vilaĝoj. Belegaj, naciaj kostumoj altiris ĉies okulojn.

[Naciaj dancoj, kantoj, kostumoj, humora sakfajfilisto (tipa paŝtisto el ĉirkaŭaĵo) montris je edziĝfestmarŝado, k. a. estis por ĉiuj multe interesaj. Tuta herbejeco estis, kiel viva tapiŝo eksterordinara. Neniam sur Kordiky estis ankoraŭ tia internacia, gaja vivo..." tiel oni povis aŭdi paroli.

De la 23.^a ĝis la 25.^a estis organizita granda ekskurso tra Slovakujo. El Banská Bystrica, tra Bezno, Domica (belegaj stalaktitaj grotoj ĉe hungara limo), Levoča, Rožnava, Dobšina..., lagoj, pejzaĝoj mirindaj, imponaj rokegoj, ĉarmaj promenoj, intereseĝaj grimadoj, ĉio. Oni reiris en tendaron. La ekskurso postlasis fortan impreson en ĉiu partoprenanto. Slovakujo!, belega paradizo.

La 26-an. estis oficiala kunveno de S. E. L., en la tendaro. Sub prezido de frato S. E. Mann la kunveno efektiviĝis kun granda entuziasmo kaj multenombra ĉeestantaro. Oni legis salutleterojn el 16 landoj. Diversaj skoltuloj interesiĝis.

Oni priparolis eblecojn de disvastigo de SEL en skoltaj grupoj, pri kursoj, frato Pecháček el Polujo promesis en nombro de polaj gesamideanoj venontjaran gastigon de SEL-anoj okaze de la Slava Ĵamboreo.

La kunvenon fermis frato A. M. Macek dankante al ĉiuj pro ĉeesto. Li esprimis sian ĝojon, feliĉon kaj dankon al ĉiuj, kiuj iel kunlaboris por sukceso de la tendaro.

Diversaj ĵurnaloj, gazetoj k. t. p. raportis pri la tendaro.

La 29-an. estis paradmarŝadoj tra la urbo en B. Bystrica. D-ro Karol Körper el Bratislava, faris festparoladon en slovakaj kaj esperantaj lingvoj. Vespere estis internacia akademio por la publiko.

Jen, kio estis nia XIII^a tendaro. Ni ripetas: tre gravaj estas por nia movado tiel skolta, kiel esperantista, similaj tendaroj. Nur dezirinda estus pli multenombra ĉeesto en intereso de komuna ideo. Necese estas prepari fratajn skoltojn kaj skoltinojn per instruado kaj ellernigo je nia Esp-o, kaj entuziasmigi ilin por alporti siajn oferojn kaj partopreni ĉiujn internaciajn tendarojn, kunvenojn, k. t. p.

Per skolta volo, diligenteco, fervoro kaj ofero tio estas tute certe ebla!

A. PEDRO MARQUETA.

S. E. L., agente en Hispanujo

SPRITAJOJ

Violonisto koncertas en salono. Fama muzikkritikisto, al kiu la artisto estas tre rekomendita, post atenta aŭskultado klinas sian kapon al apuda amiko kaj flustras:

—Li ludas la violonon tre simile al Paderewsky.

—Nu, Paderewsky ne estas violonisto!

—Pro tio mem; ankaŭ ne ĉi tiu!

* * *

Aŭtomobilismo ne lasas al la veturilistoj vivadi.

Kaj ankaŭ ne al la ceteruloj; tio estas ĉiutage konstatebla fakto.

* * *

—Nu, mia kara, ĉu vi ne mortis?

—Ne, sed mi saviĝis ja mirakle.

—Kial do?

—Ĉar feliĉe por mi mia kuracisto, Dro. X, mal-saniĝis nelonge post mi.

* * *

Radiricevilo estas tre simpatia aparato: Povi per nura duonturno je butono sufoki la voĉon de tenorulo nin incitanta per stulta kantato estas ja plezuro treege valora.

* * *

Inter pretersinpasantaj surduloj, el kiuj Johano portas ĉaspafilon.

—Adiaŭ, Johano. Ĉu ĉasonta?

—Ne; mi estas ĉasonta.

—Nu, mi erarsupozis vin ĉasonta.

* * *

—Mi jam avertis al vi, ke mi ne povas por vi fari pluaĵajn vestaĵojn, ĝis kiam vi pagos al mi vian ŝuldon.

—Tamen, mi tute ne povas atendi tiom longe.

* * *

En klubo parolas Dro. P. M. kun sia kliento, riĉa negocisto H. J.

—Bonan vesperon, doktoro!

—Bonan vesperon, kara kliento! — respondas P. M.

—Mi ĵus disputis kun via amiko, sinjoro R. S., kiu ofendis vin gravege.

—Strange, ĉar mi tute ne faris kialon.

—Jen kiel: pro la ardo de la disputo li nomis min *veterinaro*.

* * *

Gazetvendisto krias:

—Po kvin centimoj ĉiu gazetduo.

—Tamen ili ne estas hodiaŭaj—oni lin kontraŭdiris.

—Tio ja ne malefikas. Ili nun diras same, kiel antaŭe.

* * *

Pedantulo diras en amika rondo:

—Mi estas, kiel Sokrato: Mi nur scias, ke scias nenion.

—Nu!—respondas al li ĉeestanto—sed malfeliĉe por vi ankaŭ tion ĉiuj scias.

* * *

—Mi furiozas. Mia filo obstinas edziĝi kun filino de la stratangula butikisto. Pri fiziko oni povas prave diri nenion kontraŭ la knabino. Ŝi estas tre bela.

—Kaj pri moralo, ĉu jes?

—Pri moralo estas ja tute alie: ŝi havas nek eĉ unu peseton.

AVIZO

De la unua de la nuna monato oktobro ĉiujn lundojn, merkredojn kaj vendredojn vespere klarigos mezgradan kurson por gesamideanoj nia samsocietano Sro. José Gascón.